

Leterujo, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 479, 1972.12.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni malfermis nian leterujon por respondi al la afablaj salutoj de niaj skribemaj geaŭdantoj. Ni tiam menciis, ke alvenis poŝtkartoj kaj leteroj el 28 landoj kaj 5 kontinentoj. Ni jam salutis niajn geaŭdantojn en Aŭstrio, Belgio, Brazilo kaj Britio. Ankoraŭ atendas nian respondon salutoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hispanio, Hungario, Islando, Italio, Jugoslavio, Madagaskaro, Malto, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Portugalio, Rumanio, Sovetio, Svedio, Svislando kaj Usono.

A.- En Bulgario ni salutas sinjoron Vasil Mitrovski, kiu skribas, ke en lia urbo Trojan troviĝas pluraj esperantistoj, kiuj regule aŭskultas niajn tagajn elsendojn.

Cl.- En Ĉeĥoslovakio ni salutas sinjoron František Pytloun en Poděbrady, sinjorinon Marie Kvasna en Melnik, kiu aŭskultis kun intereso la intervjuojn pri la 24-a IFEF-Kongreso en Lugano kaj deziras ricevi la esperanto-prospekton, kiun eldonis tiu turisma urbo. Tiun prospekton pri Lugano ni aldonis al la multobligita cirkulero, kiun ni dissendigis al niaj skribemaj geaŭdantoj, kiam ili petis ĝin aŭ esprimis sian intereson por la raporto pri la fervojista kongreso.

A.- Ĉiam en Ĉeĥoslovakio ni salutas sinjoron Jiri Patera en Most, kiu ŝatas niajn prelegseriojn pri la historio de la svisa esperanto-movado. Li skribas : « *Estas tre grave scii detale pri la historio de la movado kaj precipe tiri konkludojn el la tiamaj sukcesoj kaj malsukcesoj.* » Laŭ la leteroj de niaj ĉeĥoslovakaj geaŭdantoj, la esperanto-vivo en Ĉeĥoslovakio estas sufiĉe vigla, okazas renkontiĝoj, kiuj grupigas pli ol 200 partoprenantojn.

Cl.- En Danlando ni salutas sinjoron B. Holm-Laursen en Abyhøj. Kiel multaj geaŭdantoj li grumbas pri la mallongeco de niaj radio-prelegoj. Ni citas : « *Mi proponas al vi plilongigi la programojn, ĉar ili ja vere estas bonaj, sed – ŝajnas al mi – tro mallongaj.* » Ni transdonos tiun ĝeneralan peton en raporto, kiun ni faros por la direktoro de nia Svisa Radio.

A.- En Finnlando ni salutas sinjoron Jalmar Vakkari en Inkeroinen, kiu esprimas alian kritikon : Li alte taksas niajn programojn, ĉar ili estas neŭtralaj, interesaj kaj informaj. Bedaŭrinde li ne ĉiufoje havas la fortojn atendi ĝis la noktomezo por ilin aŭskulti. Plendado pri tro malfrua horo vespere estas tre ĝenerala en la leteroj de la aŭskultantoj en la orienteŭropaj landoj.

Cl.- Ĉiam en Finnlando ni salutas sinjoron Kari Mallat en Kukonkivi. Li konstatas, ke nia lando havas multajn nomojn, kaj li provis transskribi en esperanto-fonetikon la nacilingvajn vortojn, kiuj karakterizas nian landon Svislando. Laŭ li « *tiu transskribo donas strangaĵojn kiel Sviclando, Ŝvejco, Ŝuizo, ktp. La formoj Helvetio, Helvetlando, Helveta Federacio estas pli taŭgaj. Ili estas inspiritaj de la nomo de la kelta popolo helvetoj, kiuj estis la praloĝantoj de Svislando.* »

A.- En Francio ni havas multajn geaŭdantojn. Ni salutas sinjoron François Artonne en Gerzat, sinjoron Maurice Bordessoule en Etaples, sinjoron J. Bourlet en Châteaumeillant, sinjoron

Chalm kaj la Esperanto-Grupon en Le Havre, kiuj skribas : « *Ni ŝatas aŭdi viajn elsendojn, ĉar estas malmultaj okazoj por aŭdi Esperanton.* »

Cl.- Ĉiam en Francio ni salutas sinjoron B. Cheverry en Angers, kiu zorgas pri la Esperanto-Centro Kastelo Grésillon, fraŭlinon E. Dietz en Strassbourg, sinjoron Jacques Dony en La Ricamarie, sinjoron Achille Dumarquez en Anzin St. Aubin, sinjorinon Elisabeth Kohler en Besançon, kiu ŝatas la literaturajn elsendojn, kiuj alportas al ŝi ideojn por aĉeti kaj legi belajn librojn.

A.- Kun ŝi ni bedaŭras, ke estas tradukataj libroj, kiuj ofte estas senvaloraj, aŭ ke foje mankas enkonduko, kiu donu klarigojn pri la signifo de la koncerna libro en la originala literaturo.

Cl.- Ĉiam en Francio ni salutas sinjoron André Lefillastre en Equeurdreville, sinjoron A. Legret en Vire, sinjoron Lemaire en Lyon, kiu tre interesiĝis pri niaj rakontoj koncerne al la ĝeneva filozofo Ernest Naville, la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Sinjoro Albert Lienhardt en Mulhouse alte taksas nian laboron. Sinjoro Jean-Louis Saudian-Rousseau, kies pseŭdonomo estas Bukar, aŭtoro de la teatraĵo *La Reto*, kies erojn ni legis okaze de radio-prelego, avertas nin, ke tiu teatraĵo *La Reto* estis refoje ludata en aŭgusto kaj septembro en la pariza teatro Absidiole. Ni estas kontentaj pri tiu neordinara sukceso de esperanto-teatraĵo, kaj ni tre esperas povi baldaŭ legi novan teatraĵon de Bukar.

A.- Ĉiam en Francio ni ankoraŭ salutas sinjoron Marcel Maillot en Héricy, sinjoron Jean Martin en Pont de la Maye, sinjoron Henri Masson en Courbevoie kaj sinjoron M. Personne en La Varenne St. Hilaire. Sinjoro Gaston Vidal sendis al ni eltranĉaĵon el artikolo aperinta en la grava gazeto *Le Figaro*, kiu asertas, ke en Francio daŭre okazas proksimume 200 kursoj de esperanto kaj ke pasintjare la nombro de la gelernantoj estis pli ol 5'000. Ni iomete timas je propagandaj troigoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!